

**mortis nia honora Prezidanto**

**PASTRO ALFONS BECKERS  
NE PLU ESTAS INTERNI**




La anoncon ni donis pasintnumere: Pastro Beckers iris al la ĉielo. Ni povas diri, ke li apartenis al la dua generacio de la IKUE-pioniroj: tiuj, kiuj ekagis post la unua mondmilito. Al lia sacerdota vivo aldoniĝis sindona agado por la katolika esperanto-movado, kies prezidanto li estis dum multaj jaroj. Pastro Beckers naskiĝis la 15an de decembro 1908 en Berigen. Jam en 1923 kiel 15-jara gimnaziano li lernis esperanton; en 1930 li aliĝis al IKUE per la flandra sekcio (FUKE), kies religia konsilanto li fariĝis en 1935, la sama jaro en kiu li sacerdotiĝis kaj fariĝis profesoro en instruista seminario. Tie li ankaŭ gvidis plurajn E-kursojn, ĝis en 1947 li fariĝis vikario en Overpelt. En 1956 li iris kiel paroĥestro al Kwaadmechelen, kie li devis konstrui novan preĝejon. Siajn unuajn IKUE-kongresojn li partoprenis en Ljubljano kaj Antverpeno. Post la milito la jam altaĝa prezidanto Heilker petis lin fariĝi nova prezidanto; Beckers rifuzis. Sed en 1946 (precize la 1an de majo kaj dum tri tagoj) li, Heilker kaj de Jong priparolis la staton de IKUE kaj EK: je la fino Beckers estis elektita vicprezidanto de IKUE, por anstataŭigi la mortintan f-inon Larroche, tasko, kiun oni konfirmos dum la internacia Konferenco de IKUE en Drakenburgh (1947). Dum la IKUE-kongreso en Romo (1950) Beckers fariĝis *aganta* Prezidanto. En la posta Kongreso (Munkeno 1951) oni forigis tiun provizorecan "*aganta*" kaj Beckers restis prezidanto ĝis 1966. En 1965 li estis elektita ankaŭ kiel komitatano de UEA.



*23a IKUE-kongreso (Munkeno 1951): parolas Prezidanto Beckers*

Kiel Prezidanto de IKUE Beckers estis vere nelacigebla, kaj lia entuziasmo kaj laboremo kunaktivigis multajn validajn personojn; ni menciuj kelkajn eventojn: nova Statuto, kontrakto kun UEA por ke IKUE estu kunlaboranta asocio, revigligo de Espero Katolika, serio de "Kristana Kulturo" (kajeroj kun ekleziaj dokumentoj kaj pri religiaj temoj), la Eŭkaristiaj Esperanto-Mondkunvenoj, beno de Johano la 23a, felietona apero en EK de la esperanto-traduko de la Nova Testamento, propono havigi latinlingvan varban leteron al la Patroj de la Dua Vatikana Koncilio, aŭdienco ĉe Papo Paŭlo la 6a, anonco (en 1966), ke la Papo permesos esperantlingvajn legaĵojn kaj preĝadon de la fideluloj en la sankta Meso, ktp.



Dum pli ol 15 jaroj seninterrompe Pastro Beckers estis Prezidanto de IKUE. Pro siaj multaj taskoj, interalie en sia paroĥejo, li devis rezigni pri rekandidatiĝo en 1966, okaze de la 31a IKUE-kongreso en St. Gallen. Tiam li diris: *"Pli junaj fortoj transprenu la taskojn"*. La svisa kongreso, laŭ propono de la ĝenerala sekretario, Flammer, lin elektis Honora Prezidanto, unuanime kaj kun forta aplaŭdo.

Dum la postaj jaroj li daŭre subtenis IKUE'n per konsiloj kaj laboro. Li zorgis interalie pri la reto de la Landaj Rezentantoj. Oni povis renkonti lin ofte ĉe IKUE- kaj Universalaj Kongresoj: lia lasta UK estis tiu en Vieno. Lastatempe lia vid-kapablo sufiĉe malfortiĝis: tamen Espero Katolika ĉiam estis en lia koro (kiam perdiĝis ekzemplero, li tuj skribigis por ke la C.O. resendu alian).

Li forpasis la 18an de januaro 1994 en sia naskiĝurbo Beringen. IKUE priploras la perdon, certa, ke nun ĝi havas plian gard-anĝelon, kiu propetas por ni.

*IKUE-Kongreso 1987 en Ĉenstoŝovo (PL) P. Beckers ricevas gratulojn de P. Magnani. De maldekstre oni rekonas Franciszka Bardecka kaj Alberta S. Casey.*





dankebare herinnering aan  
EERWAARDE HEER

## Alfons BECKERS

priester van het Bistum Hasselt

Geboren te Beringen op 15 december 1908.

Priester gewijd te Luik in 1935.

Lector Normaschool te Moerbeke.

Parrschapspriester te Overpelt-Gloriekl.

Pastoor te Kwaadmechelen.

Rector-pastoor te Beringen sedert 1975.

Ere-priester van het Davidsfonds - KGB en  
gepensioneerde marabout.

Ere-voorzitter van het Internationaal  
Katholiek Espiranto-verbond.

Zichjes en godvruchtig in de Heer overleden en gestorven door  
het sacrament der pijn in het St. Franciscusziekenhuis te  
Hasselt op 19 januari 1994.

Voor uw geboden, uw mededelen en uw vriendschap dankt U  
van harte de familie Beckers.

Ik overschouw mijn priesterleven,  
nog hoor ik u roep "zijt ge bereid".  
Toen dacht ik mild te kunnen geven,  
ik, schepsel aan uw eindloosheid.

Traag leerde ik 't eigen onvermogen,  
verloor de waan van eigen kracht.  
Mijn deel was di'armoe van mijn pogen,  
waarvan uw volheid rijkdom bracht.

Dit blijft zo in mijn bidden, zorgen,  
ik bied ze u als oogstgift aan.  
Tot ik een "heden zonder morgen",  
met stramme hand voor U zal staan.

Dan blijft er niets meer om te schenken,  
alleen mijn ontzetselijkheid.  
Ik bid u Heer, wil mij doordrenken  
met eeuwige barmhartigheid.

Begr. Convent, Beringen-Mijn. Tel. 011/42 28 32

Druk. De Pijpe (Dirk Balle), Beringen. Tel. 011/42 20 66